**Olimpikaj Ludoj 2024**, verkita de D-ro Éric Bernard COFFINET je la 09/082024

Francion minacas krizoj politika, ekonomia, socia kaj klimata, eĉ eble baldaŭa milito, sed tamen la francaj gazetoj, radioelsendoj kaj televidelsendoj plenplenas nur per raportoj pri la Olimpikaj Ludoj !

Mi opinias, ke la inaŭgura ceremonio estis skandalo kaj granda honto por mia lando. Kutime tia ceremonio celebras la kulturon de la gastiganta lando kaj la olimpikajn valorojn : unuiĝo kaj amikeco, honesteco kaj honoro, beleco kaj lerteco, forto, kuraĝo kaj persistemo. Ĝi devus esti spektebla por ĉiuj, el kiu ajn aĝo, sekso, etno, kulturo kaj religio ili estas.

Male tiu spektaklo elpensita de la nuna Prezidento Makrono kaj de lia edzino estis agresema elmontrado, pravigo kaj glorigo de ideologio pagana, satana kaj "kvira", kiu koncernas nur tre malgrandan aron de "intelektuloj parizanaj" kaj tute ne la francan popolon. Ĝi aspektis tiom ofenda kontraŭ diversaj kulturoj kaj tradicioj, ke oni multe protestis tra la tuta mondo, eĉ la Papo, ke kelkaj kompanioj monsubtenantaj la Olimpikajn Ludojn rezignis sian helpon, ke la C.I.O (Komitato Internacia Olimpika) malebligis revidi la ceremonion pere de sia oficiala retejo, kaj ke la franca komitato estis devigita pardonpeti !

Kio estis la problemo ? Ĝi instigis al malobservo de la kvar fundamentoj sociaj : distingo inter seksoj kaj generacioj, malpermeso de murdo kaj incesto. Ĝi montris eĉ al infanoj seksaliiĝintojn, virseksorganon ŝajne nudan, triopan kisseksumadon, infanojn kun "strangaj" adoltoj kaj kantantan kapon de senkapigita reĝino kun ŝajna sangelŝpruco kaj perturba muziko. Ĝi provoke misuzis bibliajn simbolojn kiel la "rajdanton de la Apokalipso", la "oran bovidon" kaj la lastan vespermanĝon de Jesuo kun Ties disĉiploj, kiu fariĝis bankedo de la pagana dio Bakĥo, kies kulto celebris ĥaoson, frenezon kaj ĉiajn ekscesojn.

Krome la franca respubliko estas laika, tio signifas ke la franca registaro devas respekti ĉiujn religiojn kaj ne povas monsubteni iun ajn el ili. Tial tiu pagana kaj perversa spektaklo aparte ofenda kontraŭ kristanismo kaj finfine pagota per publika mono de la francianoj estas tute kontraŭleĝa kaj malmorala laŭ mia opinio... sed bedaŭrinde respegulas la dekadencon de mia amata lando.

Ĉu vi konas la "sindromon de Parizo" ? Tio estas psika perturbo trafanta japanajn turistojn, kiam ili traŭmate konstatas la malkongruon inter la tiel nomata "Lum-Urbo" imagata de ili kaj la reala urbo ege malpura kun stratoj plenaj je rubaĵoj, ratoj, malĝentilaj francoj kaj mizeruloj...